

La neĝa blovado de Puŝkin : *Antaŭparolo* de Grabowski
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 435 1972.02.09 & 12

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni salutis la aperon de reeldonaĵoj. Temas pri arkivaĵoj, kiujn ĝis nun nur fakuloj povis trastudi. Inter ili troviĝas rakonto de Puŝkin : *La neĝa blovado*, kiun tradukis Antoni Grabowski, kaj kiu jam aperis en 1888, kiam esperanto estis nur unujaraĝa lingvo-projekto.

A.- Ni memorigas al vi, ke estas inter Grabowski kaj Zamenhof, ke okazis la unua konversacio en esperanto, tio kelkajn monatojn antaŭ ol tiu broŝuro *La neĝa blovado* aperis.

Cl.- En tiu konversacio Grabowski esprimis sian admiron rilate al la lingvo internacia de D-ro Esperanto, kiun li trovis genie konstruita. Samtempe Grabowski instigis la aŭtoron de esperanto publikigi en tiu Lingvo internaciajn tradukojn el literaturaj ĉefverkoj.

A.- Grabowski ne kontentiĝis doni konsilojn. Li laboregis, liverante jaron post jaro verajn literaturajn perlojn. Kun Zamenhof li riĉigis esperanton, donante al ĝi la necesajn novajn radikojn, kaj farante de tiu lingvo-projekto lingvon riĉan, flekseblan kaj tute taŭgan por literaturo.

Cl.- Grabowski naskiĝis du jarojn antaŭ Zamenhof. Li faris inĝenierajn studojn kaj verkis en la pola verkojn kaj vortarojn, kiujn poste uzis tuta generacio da teknikistoj kaj sciencistoj. Li mortis en 1921, ricevinte la titolon **La patro de la esperanta poezio** pro sia fama poezia antologio *El Parnaso de Popoloj*, kiu aperis en 1912.

A.- Estas interese legi, kion Grabowski diris pri esperanto kaj pri Zamenhof en la *Antaŭparolo* al *La neĝa blovado*. Aŭskultante tiun antaŭparolon, rememoru, ke esperanto estis nur unujara, ke Grabowski estis kelkmonata esperantisto, kaj ke ĝis tiam aperis nur tri broŝuroj en esperanto : *La Unua Libro* (1887) en diversaj eldonoj : pola, rusa, germana, franca, ktp., *La Dua Libro* kaj ties *Aldono* (1888). En la *Antaŭparolo* al tiu *Dua Libro* Zamenhof esprimis la bezonon retiriĝi el la scenejo profite al internacia kongreso, kiu ricevus gvidfunkcion.

Cl.- Vi nun ricevis sufiĉe da informoj por povi kompreni la *Antaŭparolon* al la libro *La neĝa blovado*. Jen ni citas Grabowski :

A.- « En la « *Aldono al la dua Libro de l' lingvo internacia* » la aŭtoro nin sciigas ke la « *Amerika Filozofia Societo en Filadelfio* » decidis kunvoki internacian kongreson de ĉiuj instruistaj societoj por decidi la finan formon de la lingvo internacia. La aŭtoro

Cl.- (tiu estas Zamenhof)

A.- *La aŭtoro, transdonante sian laboron al la estonta kongreso, foriras de l' sceno kaj volas resti nur simpla amiko de l' afero, ne havanta jam la kompetentecon de ia kondukado aŭ leĝdonanto. [...]*

Cl.- *Por mallonge diri : la foriranta aŭtoro montras al ni en la broŝureto la vojon, kiel ni mem sen kondukanto povas nun tute libere labori por l' afero, eldoni verkojn, krei vortojn kaj cetere, ĝis la estonta kongreso. »*

A.- Nun Grabowski donas klarigojn pri sia laboro. Reaŭdu lin :

Cl.- *« La verko de l' aŭtoro, kiel ankaŭ la vojo, kiun li elektis, montris sin bonaj ; la aŭtoro bone pripensis la ilojn, kiuj kondukas al la celo. Al ni hodiaŭ restas nur ekprovi, ĉu ni jam efektive povas stari mem sur propraj piedoj. Ni komencu !*

A.- *Por ekprovi miajn fortojn mi elektis malgrandan rakonton, sur kiu mi antaŭ kelkaj jaroj lernis la rusan lingvon, kaj mi donis al ĝi internacian veston. La rakonteto, unu el la plej belaj de Puŝkin, donas en sia simpleco kaj natura fideleco konvenan pentron de la karaktero de l' lando kaj de ĝiaj anoj.*

Cl.- *Kiel vere la aŭtoro de l' lingvo internacia diris, ke oni povas tute libere esprimi siajn pensojn per la malmultaj vortoj de l' vortareto (dank'al la kunmetebleco de la radikoj,) ni vidis en la « Dua Libro » kaj en la « Aldono » ; mi vidis tion saman dum la tradukado de la nuna rakonto.*

A.- *Mi preskaŭ ne bezonis krei novajn vortojn kaj povis tute fidele traduki, kvankam oni trovis, ke la rakonto estas multe riĉa je malsamaj vortoj.*

Cl.- *La solaj du nomoj de arboj, kiujn mi ne povis formi el la radik-vortoj, mi prenis el la lingvo latina, ĉar en botaniko ĝi ja estas internacia.*

A.- *Mi deziras ke tiu ĉi libreto estu la komenco de l' eldonado de similaj verketoj. Se ankaŭ aliaj amikoj de la lingvo internacia alportos similajn ŝtonetojn por nia konstruo, ni baldaŭ havos ne sole lingvon internacian, sed ankaŭ la unuan veran « bibliotekon internacian », kaj la afero iros tiam rapide antaŭen. (Fino de la citaĵo.)*

Cl.- Kiel vi konstatis, tiu antaŭparolo de Grabowski reliefigas la talenton de Zamenhof kaj donas tutan programon, kiu tutcerte instigis multajn aliajn esperantistojn al ekago. La venontan semajnon ni legos al vi eron el tiu rakonto de Puŝkin : *La neĝa blovado*, kiun tre sagace tradukis Antoni Grabowski, kvankam farante neeviteblajn erarojn pro ekesperantiĝo.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!